

Citaĵoj el TREZORO, II

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-003-A-1, 1990.12.22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- La du pasintajn sabatojn ni instigis vin akiri la duvoluman antologion pri la **ESPERANTA NOVELARTO** titolita **TREZORO**, kaj ni komencis laŭtlege prezenti al vi kelkajn el la prozaj specimenoj, kiujn Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ submetas al nia legemo. Hodiaŭ ni instigas vin malfermi la verkon **TREZORO** je la paĝo 130-a, kie troviĝas teksto El "**La Ĝoja Podio**" de **Raymond SCHWARTZ**:

Cl.- Por paroli necesas malfermi la buŝon. Sed kiam oni malfermas la buŝon, ne estas ĉiam por ion diri. Oni povas malfermi la buŝon por manĝi, aŭ trinki, aŭ spiri plenpulme, aŭ por oscedi, aŭ esprimi miron, aŭ tute simple por... malfermi la buŝon, kiel ekzemple, ĉe la dentisto, kiam oni sidas sur la komforta torturseĝo.

A.- Tiurilate, ĉu mi rajtas rimarkigi, ke la dentistoj ĝenerale estas malbonaj pedagogoj? Por komenci ili diras al vi:

Cl.- "Malfermu la buŝon!"

A.- kaj tiam ili tuj ŝovas inter viajn vangojn tutan aron da fremdaj aĵoj, vaton, paperon, kaŭĉukon, pinĉilojn, ŝraŭbojn, tenilojn kaj nun, kiam via buŝo estas ĝiseksplode plena kiel militpreta arsenalo, nun ili naive demandas:

Cl.- "En kiu dento vi sentas doloron?..."

A.- al kio vi povas respondi nur per onomatopaj gargarsono.

Cl.- Simile nekomprenemaj estas la hartondistoj. Ĉiufoje, kiam mi sidas sub la blanka tolaĵo, kvazaŭ oficanta pastro dum la vesproj, la deĵoranta artisto ĝentile forprenas miajn okulvitrojn, pretekstante, ke ili ĝenos liajn manovrojn, kaj tuj poste li enmanigas al mi amason da gazetoj, kiujn kompreneble mi ne povas legi pro manko de miaj okulvitro.

A.- Vidante, ke mi ne deziras legi, li pensas, ke mi emas konversacii kaj tuj li komencas:

Cl.- "Vi ne plu havas multe da haroj, sinjoro !"

A.- Tio, evidente, signifas paroli por nenion diri - ĉar mi ne bezonis ateston de specialisto por scii, kion mi scias.

Cl.- Kaj tio estas la katastrofo de la mondo, ke la homoj parolas ju pli, des malpli ili havas por diri kaj kiam ili havas multon por diri, ili silentas!

A.- Vidu, kiam vi akompanas karan amikon al la stacidomo, de kie forportos lin por multaj jaroj la senkora vagonaro, vi sentas, ke postrestas nur mallongaj momentoj kaj vi havas ankoraŭ tiom da aferoj, kiujn vi nepre volus priparoli. Neniam sufiĉos la kelkaj minutoj kaj... vi silentas, aŭ, kiam fine vi tamen ekparolas, estas por demandi:

Cl.- "Ĉu vi estas certa, ke vi ne forgesis vian poŝtukon?"

A.- Vidu la geamantojn! - Jen hometoj, kiuj dezirus detale priskribi sian feliĉon, eldiri en historiaj vortoj sian amon, sian ĝojon, sian admiron, sian Dio-scias-kion, kaj... ili silentas.

Cl.- Estas vere, ke ili staras sur la sojlo de gravaj decidoj.

A.- "Ĉu jes? Ĉu ne?"

Cl.- Kaj saĝe konsilas la proverbo, ke antaŭ ol diri definitivan stultaĵon, oni devas turni almenaŭ sepfoje la langon en la buŝo.

A.- Kaj tio ŝajne estas la sola konsilo, kiun la geamantoj konsentas obei.

Cl.- Tial, antaŭ ol interŝanĝi poreternajn ĵurpromesojn, tre konsciencie, kaj pli ol sepfoje, ili turnas la langon en la buŝo... unu de la alia.

A.- Ne nur Raymond SCHWARTZ humuras pri la vivo. Jen vi konatiĝu kun tiu Martha WALKER per la laŭtleĝo de **La hipio kaj la sinjorino**.

Cl.- Tiu teksto, kiun ni iom mallongigas, troviĝas je la paĝo 647-a de **TREZORO**.

A.- La eleganta sinjorino vidis malgrasan hipion etendanta la dikfingron pete. Tujtuj ŝi haltigis sian aŭtomobilon kaj invitis la hipion eniri. "Ĉu vi volas hejmeniri kun mi?"

Cl.- (La hipio preskaŭ perdis la spirpovon.)

A.- "Ĉu vi estas malsata? Ĉu vi ŝatus manĝi frambukon kun kremo? Ĉu vi deziras tason da kafo?"

Cl.- (Jesuo ! pensis la hipio. Mi devas esti en la ĉielo! Eble mi sonĝas !)

A.- Sed ne estis sonĝo. Baldaŭ ili atingis la hejmon de la bonkora sinjorino, kaj... ŝi alparolis lin ĝentile: "Nun, kara, vi demetu viajn vestaĵojn".

Cl.- Ĉu ? Kio ?!

A.- Envere, la vestaĵo de la hipio konsistis nur el ĉifonaĵoj. Tre volonte tiu komencis demeti ilin ĉiujn.

Cl.- La sinjorino diris,

A.- "Mi baldaŭ revenos. Nur demetu ĉiujn vestaĵojn, bonvole!"

Cl.- Ŝi malaperis.

A.- La povra hipio, la malgrasulo, nun staris nuda! Jes, nuda li staris en la bela sinjorina buduaro!

Cl.- Li atendis, mi devas rakonti al vi, iom malpacience la tujan revenon de la eleganta, bonkora sinjorino. La pordo de la ĉambro malfermiĝis, kaj la sinjorino eniris man-en-mane kun knabeto. Kaj nun ŝi diris severe al la etulo,

A.- "Jen! Rigardu, kio okazos al vi se vi ne manĝos vian spinacon!"

Cl.- Pri Martha WALKER, la aŭtorino de tiu novelo, la biografia notaro diras, ke tiu usonanino naskiĝis en 1905, mortis en 1983 kaj verkis sennombrajn artikolojn. Espereble eldonisto ilin foje publikigos libroforme.

A.- La venontan sabaton ni ree kaj lastfoje direktos vian atenton al la antologio pri la **esperanta novelarto**, kiun duvolume eldonis Hungara Esperanto-Asocio la pasintan jaron sub la titolo **TREZORO**.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo kaj bonan kristnaskon !